

# La Unua Komuniko de la 45-a Konferenco de ILEI

## ***Per artoj al paco***

Post la neforgesebla ILEI-konferenca semajno en Matanzas (Kubo, 2010) kaj rekorda konferenco en Kopenhago (Danio, 2011), ILEI konferencos en Ĉinio en la jaro 2012, dum la semajno antaŭ la UK en Hanojo.

**Konferenca urbo:** Kunming, provinco Yunnan en suda Ĉinio.

**Datoj:** 20-26 julio 2012.

**Konferencujo:** Profesia Artkolegio de Kunming.

**Loĝado kaj manĝoj:** En hotelo ene de la Kolegio. Eblas elekti loĝadon ankaŭ en pli luksa hotelo en la urbo.

**Transporto al Hanojo por UK:**

Flugo 1,5 horojn, aŭ

Tuttaga postkonferenca ekskurso per buso ĝis la vjetnama landlimo  
+ litvagonare ĝis Hanojo

**Konferenca temo:**

### ***La arto de komunikado, komunikado de artoj***

Lingvoj de scienca komunikado kaj edukado estis la kerna temo de la diskutoj dum la 45-a konferenco de ILEI en Kopenhago. La artoj kun siaj universalaj pedagogiaj valoroj, specifaj esprimrimedoj kaj aparta kapablo de komunikado trans la lingvaj kaj kulturaj limoj nature aldoniĝas al tiu interesdirekto. La Kunminga Artkolegio disponigas la ĝustan medion por konferenci pri la graveco de artoj por edukado al la kulturo de paco, al estimo de la homo kaj al respekto de la naturo.

La provinco Yunnan situas ĉe landlimo de sudokcidenta Ĉinio kaj ĝi havas vastan teritorion, grandiozan montaron kaj riveraron kaj abundan naciecan kulturan riĉfonton de 25 naciminoritatoj. En la provinco loĝas plej multaj naciminoritatoj. Diversaj naciecoj tenas sian naciecan tradicion en disvolviĝo, inkluzive de kanto, danco, moro kaj kutimo, popolaj loĝejoj kaj aliaj.

## Konferencurbo

Kunming estas la ĉefurbo de la provinco Yunnan. Situanta ĉe la landlimo de sudokcidenta Ĉinio, Yunnan havas vastan teritorion, grandiozan montaron kaj riveraron. Abunda estas ĝia kultura riĉaĵo, kiu fontas el daŭre gardataj kaj disvolviĝantaj etnaj tradicioj de 25 naciminoritatoj, inkluzive de kantoj, dancoj, moroj kaj kutimo, popolaj loĝejoj kaj aliaj. La provinco Yunnan ankaŭ estas unu el gravaj luliloj de la homaro kaj posedas longtempan historion kaj antikvecan civilizacion.

Kunming, famkonata kiel printempa urbo, situas sur altebenaĵo, proksime de la lago Dian Chi (konata kiel „Perlo de la altebenaĵo”) kaj ĝojigas homojn per lazura kaj serena ĉielo. La urbo havas internacian flughavenon kaj estas centro de fervojoj kaj ŝoseoj. Tra la urbo Kunming estas transportataj varoj el Ĉinio al Vjetnamio kaj al la ceteraj proksimaj landoj.

Kunming havas subtropikan altebenaĵan musonan klimaton. Tie apenaŭ estas somero dumjare kaj vintro daŭras nur 2 monatojn. La urbo ĝuas printempon kaj aŭtunon dum 4/5 de la jaro. Kunming estas fama pro la Ŝtonarbaro kaj Ora Templo. En Xisxuangbanna vizitindas la Tropika Botanika Ĝardeno, taj-nacia vilaĝo Mandou, Manting-Parko kaj Parko de ĉinaj etnoj.

## Gastiganto de la konferenco

La Profesia Artkolegio de Kunming estas sankciita de la Yunnan-a Registaro, kaj registrita ĉe la ŝtata Ministerio de Edukado kiel ĝenerala alta lernejo de arta kategorio.

La kolegio situas ĉe la fama lago Dian Chi, kun belega natura ĉirkaŭaĵo kaj kompletaj instalaĵoj. La kleriga programo de la kolegio ampleksas 28 fakojn kiel: muziko, dancado, aspektigado, komunikado, enaviadila servo, fremdlingvoj, sportoj ktp. Ĝi havas pli ol 3000 studentojn el pli ol 30 etnoj kaj 26 provincoj de Ĉinio. La hotelo de la kolegio certigas la bezonatan komforton por la konferencanoj, sed eblos loĝi ankaŭ en proksimaj urbaj hoteloj.

## Kotizoj

La baza aliĝkotizo dependas de la landokategorio kaj la aliĝdato de la aliĝanto. Estas du landokategorioj:

- A. Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B.  
 B. Iamaj socialismaj landoj de orienta Eŭropo; ĉiuj landoj de Afriko, Latinameriko kaj Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.)

| Aliĝperiodo:                | ĝis 31.03.12 |      | ĝis 30.06.12 |      | post 30.06.12 |      |
|-----------------------------|--------------|------|--------------|------|---------------|------|
| Aliĝkategorio:              | A            | B    | A            | B    | A             | B    |
| Membro de ILEI (1)          | 50 €         | 30 € | 60 €         | 35€  | 70 €          | 45 € |
| Ne-membro de ILEI           | 65 €         | 40 € | 75 €         | 45 € | 90 €          | 55 € |
| Junulo (2), handikapulo (3) | 25 €         | 15 € | 30 €         | 20 € | 35 €          | 25 € |

- (1) Membro estas tiu, kiu jam pagis kotizon al ILEI por la jaro, kiam okazas la konferenco;  
 (2) Junulo estas konsiderata tiu, kiu naskiĝis post la 31-a de decembro 1980.  
 (3) Bonvolu sendi al ILEI atestilon.

Aliĝkotizo por unu tago estas 25 € por A- kaj B-landoj. (Loĝado, manĝado, ekskursoj kaj aliaj servoj pagendas aparte, laŭ oferto kaj prezaro, kiuj aldoniĝos al ĉi tiuj informoj.)

Rabatitaj kotizoj por fruaj aliĝintoj, kiuj pagas ĝis 31 dec 2011: A – 40 EUR, B – 25 EUR.

Premiaj rabatoj: 10% por ĉiu deka aliĝinto, 50% por la 50-a kaj 100% por la centa.

## Programo

La konferenca programo, kun siaj tri esencaj fadenoj – faka, labora/organiza kaj kultura/distra – evoluos tra la konferenca semajno laŭ la jena skemo:

Vendredo, 20 julio 2012:

- Akcepto de konferencanoj,
- Interkona Frandvespero;

Sabato, 21 julio 2012:

- Solena malfermo
- Prelegoj,
- Komitatkunsido,

- Ĉina Vespero, malfermita por la konferenca kaj eksterkonferenca loka publiko, por prezenti Ĉinion kaj ĝian kulturen riĉecon; la programon de la Ĉina Vespero prezentos artistoj de la Arta Kolegio de Kunming;

Dimanĉo, 22 julio 2012:

- Prelegoj,
- Forumoj (metodika, pri komunikado kaj informado pri E-o k.c.),
- Laborgrupoj,
- Vespera kultura kaj distra programo;

Lundo, 23 julio 2012: ekskursoj;

Mardo, 24 julio 2012:

- Prelegoj,
- Komitatkunsido,
- Lingva festivalo,
- Vespera kultura kaj distra programo;

Merkredo, 25 julio 2012:

- Simpozio pri la konferenca temo,
- Vespera kultura kaj distra programo;

Ĵaŭdo, 26 julio 2012:

- Konkluda simpozia sesio,
- Komitatkunsido,
- Ĝenerala debato,
- Fermo de la konferenco,
- Vespera kultura kaj distra programo – adiaŭa vespero kun kontribuoj de artistoj de la Arta Kolegio de Kunming;

Vendredo, 27 julio 2012: postkonferenca ekskurso – transporto al Hanojo por UK.

Paralele kun (aŭ enkadre de) aliaj programeroj dum la semajno okazos ankaŭ:

*La 2-a ISOA (ILEI-Seminario en Orienta Azio)*

*Festa programo omaĝe al la 125-jariĝo de la Unua libro*

- Ferma sesio de 'e125'

*Kleriga programo:*

- Seminario: Ĉina kontribuo al la monda kultura heredaĵo,
- Kursoj de Esperanto por komencantoj,

- E-atelieroj por progresantoj,
- Metodikaj atelieroj/konsilejoj por instruistoj de Esperanto,
- La ĉina eksprese,
- E-ekzamenoj de ILEI/UEA.

## **Loka Konferenca Komitato**

**Honora prezidanto:** rilata estrarano de la Provinca Edukada Departemento

**Honora vicprezidanto:** rilata reprezentanto de loka estraro

### **Prezidanto:**

– Prof. d-rino GONG Xiaofeng (Arko), sekciestro de ILEI-CN

### **Vicprezidantoj:**

- Prof. DUAN Yongxin, estro de la Profesia Artkolegio de Kunming, membro de ILEI
- S-ro HUANG Yinbao (Trezoro), sekretario de ILEI.
- S-ro LIU Baoguo (Optimisto), vicestro de ILEI-CN

### **LKK-anoj:**

- S-ino YU Jianchao, parolistino de Ĉina Radio Internacia, komitatano de ILEI
- S-ino CHEN Ji, asista direktoro de *El Popola Ĉinio*, ĉefsekretario de la landa asocio de E-instruistoj
- S-ro WANG Minhao, prezidanto de Ŝanhaja E-asocio
- Prof. ZHOU Liuxi (Lucio), el la Pekina normala Universitato
- S-ro HAN Zuwu, IRE-ano de ILEI/UEA, prezidanto de Tianjina E-asocio
- S-ro PENG Zhengming (Trigo), prezidanto de Hubei-a E-asocio.
- S-ro ZHANG Lianjin, membro de la konstanta konsilio de Yunnan-a E-asocio.

Kunming invitas vin: venu kaj partoprenu, lernu kaj lernigu, ĝuu kaj ĝuigu  
 – laŭ la tradicia etoso de ILEI-konferencoj kaj nova elano de ILEI en Orienta Azio.

*GONG Xiaofeng (Arko), sekciestro de ILEI-CN, Prezidanto de LKK  
 Radojica PETROVIĆ, ILEI-estrarano pri edukprojektoj kaj konferencoj*

# Aliĝilo

La 45-a konferenco de ILEI, Kunming, 20-26 julio 2012

## **La arto de komunikado, komunikado de artoj**

- Persona nomo \_\_\_\_\_  
Familia nomo \_\_\_\_\_  Ino  Viro
- Datoj (jjjj-mm-tt) de: alveno \_\_\_\_\_ foriro \_\_\_\_\_
- Lando \_\_\_\_\_ Kodo, urbo \_\_\_\_\_  
Loĝadreso \_\_\_\_\_  
Retadreso \_\_\_\_\_ Fakso \_\_\_\_\_  
Telefono \_\_\_\_\_ Poŝtelefono \_\_\_\_\_
- Naskiĝdato (jjjj-mm-tt) \_\_\_\_\_ Profesio \_\_\_\_\_
- Mi kotizas \_\_\_\_\_ EUR kiel (elektu unu el la kotizkategorioj):  
 membro de ILEI,  ne membro,  junulo,  handikapulo.
- Mi kontribuas \_\_\_\_\_ EUR por ILEI-agado tra jena(j) kaso(j) / fonduso(j) / agado(j): \_\_\_\_\_
- Mi konsentas / ne konsentas (forstreku unu) ke mia adreso aperu en la listo de partoprenantoj!
- Mi komprenas, ke la aliĝo validas nur post kompleta pago en unu el la jenaj manieroj (indiku vian pagmanieron):  
 Al ILEI-konto ĉe ING-banko, IBAN: NL55INGB 0004676855, BIC: INGBNL2A. Aldonu 5 € por nederlandaj bankokostoj se vi pagas de ekster Eŭropa Unio.  
 Al ILEI-konto ĉe UEA *ilek-a*, indikante "ILEI-konferenco 2012"  
 Ene de Ĉinio, bonvolu kontakti la sekciestron de ILEI-CN, GONG Xiaofeng (Arko), arko.gong@qq.com
- **Mi komprenas kaj akceptas la partoprenkondiĉojn kaj regulojn.**
- Mi bezonas / ne bezonas invitilon kiel civitano de \_\_\_\_\_  
kun pasporton n-ro \_\_\_\_\_ valida ĝis \_\_\_\_\_.

Loko, dato \_\_\_\_\_ Subskribo \_\_\_\_\_

*(La aliĝintoj ricevos 2-an mendilon poste,  
por difini la precizajn servojn petatajn.)*

## **Kondiĉoj pri pagoj kaj repagoj por la konferenco de ILEI**

- La aliĝkotizo ne inkluzivas ajnan asekuron, loĝadon, manĝojn, ekskursojn kaj aliajn eventualajn aparte pagendajn aferojn, pri kiuj informoj, mendiloj kaj prezoj aperos en IPR 2012/1, en la retpaĝaro de ILEI kaj tra aliaj komunikkanaloj.
- 50% de la aliĝkotizo kaj 80% de la sumo por mendoj estos repagitaj, se la aliĝinto malaliĝos pro valida kaŭzo antaŭ la 15-a de junio 2012. Malaliĝinte pro valida kaŭzo antaŭ la 1-a de julio 2012, la aliĝinto ricevos 60% de la sumo por mendoj, sed ne la aliĝkotizon. Malaliĝinte pli poste, la aliĝinto ne ricevos ajnan repagon.
- Kaze de ne-okazigo de mendita servo (ekz. pro ne sufiĉa kvanto de aliĝantoj), la pagita sumo por la koncerna servo estos repagita.
- Konferencaneco estas transdonebla, sed necesas alpagi la diferencon depende de la lando kaj aliĝperiodo. ILEI ne repagas la diferencon kaze de transdono al aliĝanto en malpli kosta kategorio.

### **Citaĵo el la konferenca regularo:**

6. Konferencanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Konferencan Regularon aŭ malutilas al la ILEI-Konferenco kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas la ILEI-Konferenco.
7. Ĉiu vendado de varoj en ILEI-Konferenco bezonas antaŭan aprobon de la Estraro, kiu starigas la kondiĉojn. Skriba peto pri tia agado estu liverita al la Estrarano pri Konferencoj nepre antaŭ la 30-a de junio de la konferenca jaro.

### **Subtenu aliajn**

Kiel kutime, ankaŭ ĉi-jare ni petas vin laŭeble subteni ne-pagipovajn kolegojn kaj la agadon de ILEI ĝenerale. Vi povos aldone al via aliĝo donaci al la *Koleghelpa Kaso* (per kiu ILEI membrigas ne-pagipovajn instruistojn), al la *Fonduso Dazzini* (subteno al ne-pagipovaj partoprenantoj de konferenco), al la konferenca kaso ktp. Legu pli: <http://ilei.info/dok/Kasoj%20de%20ILEI.pdf>

### **Kontakto, kien sendi paperan aliĝilon**

Bonvolu neniam skribi al la konferencejo, sed nur al la estrarano pri konferenco 2012: Radojica Petrović, Bulevar oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio; retadreso: rade@ikso.net; aŭ al info@ilei.info.